

AVENO #41 - Homaj Rajtoj
Januaro - Junio 2015

Ghenerala rimarko: pluraj informoj alvenas kun peticio - kompreneble plej multaj el ili ne plu estas aktivaj. Do, bonvolu kontroli la daton, se vi intencas subskribi ian ajn peticion.

Ligoj:

AVE: <http://www.verduloj.org> , novaj artikoloj je la enirpago, aliaj sub "Dokumentoj

Lingvaj Rajtoj = Homaj Rajtoj: <http://www.lingvaj-rajtoj.org/>

Tutmondaj Mondcivitanaj Teritorioj: <http://www.recim.org/dem/tcm-list.htm>

===

2015-10- Klimato- kaj Medioprotektado sur la tegmento de la mondo

Tibet Initiative Deutschland e.V.

E-Mail: office@tibet-initiative.de

www.tibet-initiative.de

Literaturo:

[https://www.tibet-](https://www.tibet-initiative.de/de/aktionen/aktionen_kampagnen/umweltkampagne_greentibetfreetibet/)

[initiative.de/de/aktionen/aktionen_kampagnen/umweltkampagne_greentibetfreetibet/](https://www.tibet-initiative.de/de/aktionen/aktionen_kampagnen/umweltkampagne_greentibetfreetibet/)

Detalaj informoj pri problemoj rilate resurso-ekspluatadon en Tibeto (germana):

https://www.tibet-initiative.de/fileadmin/user_upload/Talking_Points_Raubbau_in_Tibet.pdf

v

Gabriel Lafitte (2013): Spoiling Tibet - China and Resource Nationalism on the Roof of the World. London & New York: Zed Books.

v

Michael Buckley (2014): Meltdown in Tibet – China’s Reckless Destruction of Ecosystems from the Highlands of Tibet to the Deltas of Asia. New York: Palgrave Macmillan.

v

Tibet Watch (2015): Environmental Protests on the Tibetan Plateau. Tibet Watch Thematic Report. January 2015.

http://www.tibetwatch.org/uploads/2/4/3/4/24348968/environmental_protests_on_the_tibetan_plateau.pdf

v

Canada Tibet Committee (2015): Assembly and Association Rights in the Context of Natural Resource Exploitation (Tibet). Submission to the United Nations Rapporteur on the Rights to Freedom of Peaceful Assembly and of Association.

www.tibet.ca/_media/PDF/SubmissionSRFreedomAssembly.pdf

v

Canada Tibet Committee (2014): Request for Review Submitted to Canada’s National Contact Point Pursuant to the OECD Guidelines for Multinational Enterprises. Specific Instance Regarding: The Operations of China Gold International Resources Corp. Ltd., at the Copper Polymetallis Mine at the Gyama Valley, Tibetan Autonomous Region.

www.tibet.ca/_static/NCP.CGIR.jan2014.pdf

v

Human Rights Watch (2013): “They Say We Should Be Grateful” – Mass Rehousing and Relocation Programs in Tibetan Areas of China.

http://www.hrw.org/sites/default/files/reports/tibet0613webwcover_0.pdf

2015-11-25 Rusa chasaviadilo kaj Pola registaro

Ni ne scias kio vere okazis antaŭ la turkoj forpafis la rusan militaviadilon ?

Turkio diras ke tiu aviadilo malgrau pluraj atentigoj enflugis en la limojn de Turkio (kaj ne estis la unua tia okazajho).

Rusio neas tion.

Bedaurinde Rusio ne plu estas plene kredinda - la tieaj regantoj mensogis pli ol unu fojon.

Turkio protektas la turkmenojn en Sirio, kiuj estas chasataj de la rusaj aviadiloj.

sed Rusio favoras Assad, kaj la kontraŭuloj de tiu estas la malamikoj de Rusio.

La sola kiu ghojegas estas la t.n. Islama Shtato.

La majoritato en Pollando elektis alian registaron - pli dekstreman; estas ja la rajto de la popolo elekti, sed la registaro devus respekti ioman kontinuecon en la politiko.

Oni maldungis TV-jhurnaliston kiu defendis teatraĵon en Wroclavo.

Oni dungis Mariusz Kaminski chefon de la sekreta servo, kiu ĵus estis punita sidi en malliberejo dum 3 jaroj.

Lau okcidentanoj tiu nova registaro troigas en sia dekstrega direkto (mii dirus pli ol 90 gradoj).

Oni ankau ne plu interesighas pri EU; pli kaj pli rifuzas akcepti la akceptitajn 7000 rifughintojn (minimuma parto por tiom granda lando).

Jes, ja, Pollando akceptis ... la multegajn miljarojn el la kaso de EU por investi en sian infrastrukturon, sed nun evidente ili havas sufiche da ... demokratio.

Same kiel Orban en Hungario ili verŝajne baldau invitos la rusan prezidenton por karesi la "donacon de Stalin" en Varsovio.

Komencighas vintro en Europo.

Tamen bondezirojn, amike, manfred

= =

2015-10-29 Rusio atakas la falsajn en Sirio - unua morta soldato.

Bedaurinde la rusa armeo en Sirio ghis nun nur atakis la ribelulojn (t.n. teroristoj).

Sed (lau niaj informoj) ne atakis la t.n. Islaman Shtaton.

Putin klopodas savi la okcidentan regionon, ĉar tie troviĝas la rusa haveno.

Feliche por Ukrainio: kelkdeko da specialistoj estis translokigita el la orienta Ukraina regiono al Sirio por subteni la batalon tie. Ghis nun mankas la rapida sukceso, malgraŭ tre intensa aero-milito.

La patrino de la juna soldato kiu mortis en Sirio protestis kontraŭ la oficiala informo, ke sia filo memmortighis - ŝi estis telefoninta al li antaŭ nelonge, kaj li estis gaja kiel kutime.

(lau taz, 2015-10-28 p.11, kaj 10-29 p.6)

2015-10-28 EU-Parlamento voĉdonis kontraŭ subventiado al tauro-batalo

La propono de la frakcio Verduloj/Regionalistoj ricevis sufiche grandan konsenton..

Sed por realigi tiun decidon bezonas konsento kun la Konsilio de la Membroshtatoj kaj de la EU-Komisiono.

(de Sven Giegold, MEP (Verduloj/Regionalistoj

2015-10-28 EU-Parlamento fortigas la Civitanan Iniciativon (ECI)

Ili reduktas la burokracion kaj postulas teknikan kaj financon subtenon.

Pli grave estus devigo al la parlamento verki legh-proponon, lau la postuloj de la ECI; sed plimulto el la kristan-popola, liberala kaj socialdemokrata frakcioj malebligis tion.

Do, restas, ke oni eble reagos al ECI. Jen la detalaj informoj (en la germana, aliaj tekstoj ankau en la angla) - de Sven Giegold, MEP Verduloj / Regionalistoj:

<http://www.sven-giegold.de/2015/europaeische-buergerinitiative-eu-parlament-staerkt-einfluss-der-buerger/>

= =

Karaj AVE-anoj,

se vi loghas en Rusio, supozeble legis alian rakonton.

Finfine alvenis la fina esplororezulto pri la mortpafita MH17 - je la 17-a de Julio 2014. Mortis preskau 300 homoj.

Ghi estis trafita de surgrunde ekpafita BUK-raketo - kaj ne de raketo el alia aviadilo.

Oni serchos pliajn argumentojn por eltrovi kiu respondecis (alfabete: Rusio, Separatistoj, Ukrainio).

Rusio kutime mensogas, kiam ili opinias tion tauge (Rusio almenau pli obstine ol aliaj landoj)

Jen la retejo kun fotoj , ktp., al ARD: <http://meta.tagesschau.de/tag/mh17>

Tiam estis pluraj rakontoj kiuj fingo-montris al Rusio, kiu helpadas al la separatistoj. Mi esperas ke iam la vero elmerghos al la taga lumo.

--

Jen du mesaghoj de JoKo, 2015-10-13, 18:39 kaj 2015-10-15, 13:18 horo [Eŭropaj Federistoj] **La flugo MH17, falinta en orienta Ukrainio, estis faligita de raketo Buk**

Nun estas oficiale: la flugo "Malaysia Airlines Mh17" estis faligita de raketo je rusa produktado. Mortis 298 homoj, el kiuj 196 nederlandanoj.

La raketo trafis unue fronte la pilotejon kaj poste detruis la ceteron. Tial - ne validas la rusa teorio, laŭ kiu MH17 estis lanĉata el la zono sub la kontrolo de la ukraina armeo;

- oni devas dedukti ke ĝi estis lanĉata de la zono sub kontrolo de la separatistoj. Sed la ribeluloj de Donetsk asertis: 'Ni ne havis la Buk-sistemo'.

Laŭ la ukraina ĉefministro tion faris la rusaj fortoj, ĉar la separatistoj ne estis kapablaj regi la raketan sistemon Buk. Kaj efektive oni supozas ke la ribeluloj ne scii ĝin regi, sen la helpo de rusaj soldatoj.

Tiam estis sufiĉe da kialoj por antaŭgarde fermi la aerospacon. Sed la ukrainaj aŭtoritaj tion ne faris.

Jen informo kaj video (kiamaniere oni kunmetis la pecetojn:

<http://www.euronews.com/2015/10/14/russia-refutes-dutch-probe-into-mh17-crash/>

Moskvo tuj reagis: la nederlanda enketo ne estas neŭtrala. Krome la raketo ne plu estas produktata ekde 1986.

Pri la respondeculoj la nederlanda teknika enketo nenion diras.

Pri tio respondos venontjare la krima enketo.

Retadresoj pri la EF-grupo: <http://groups.google.com/group/EU-federo>

(JoKo)

= =

2015-10-10 **Tri aparte bonaj novajhoj el la Nobel-premiado:**

Svetlana Aleksievic - el Belarus kaj eksa Sovetunio ricevos por sia **literatura** verko (sube mi almetas la vortojn de JoKo - plejparte)

La Premion por la **Paco** ricevos 4 CSO-oj (civil-sociaj organizajhoj) el Tunizio; kiuj persiste sekvis la evoluon de demokratio.

Herta Däubler-Gmelin admonis, ke ankau virina asocio gravis por atingi la nunan staton. Bedaurinde la turistoj estis timigitaj de islamista atenco - espereble la lando sukcesos bari tian teroran fundamentalismon.

Unu el la 3 premiotaj por **Medicino** estas Tu YouYou, kiu inspirite de Mao TseDong, eltrovis en la malnova china farmakologio plantan rimedon kontraŭ **Malario**: artemisin el Artemisia annua per malvarma ekstraktado.

Mi esperas ke finfine ankau en **Tanzanio** chiu kuracistoj povas uzi artemisin - anstataŭ la piedo-turniga je infanoj khinino (hhinino).

Certe vi jam plurfoje legis chi-tie, ke en la nord-okcidenta regiono de Tanzanio daure aperas **infanoj kies gamboj, piedoj au manoj estas torditaj**, ĉar ili (au ilia patrino) estis kuracitaj kontraŭ **Malario** pere de injekcio de khinino - kiu kausis ne-egalan tension je la muskoloj, kaj sekve tordigon de la ostoj.

Enkadre de Mazingira ni denove helpis al 2 infanoj, la komunumo de Ketare al la 3-a. Sed atendas aliaj 3-4.

Se vi povas helpi - bonvolu transpigi al avex-z che UEA iom da nebezona por vi mono.

Finfine ni sukcesis akiri la bezonatan monon (11 mil Euro) por aĉeti la materialon por la 3-a projekto Akvo por Kalima. El-koran dankon al ĉiuj kiuj subtenis tiun-ĉi projekton. Sed atendas pliaj: por kolekti pluv-akvon je Mazingira en Tanzanio - en 2016. Mi esperas, ke ni ricevos shtatan helpon por la restanta bezono da trinkakvo en Kalima ?

Bondezirojn, amike, manfred

La 67-jara Nobel-premion pri Literaturo 2015 ricevos Svetlana Aleksievic.

Ŝi estis instruistino, verkistino, ĵurnalistino kaj eseistino.

Ŝi naskiĝis en Ukrainio, kreskis en Belorusio kie doktoriĝis pri historio, kaj ekde 2000 eziliĝis en Parizo.

Ŝi venkis pro "ŝia verko plurvoĉa, monumento al kuraĝo kaj al doloro en la nuntempo".

Ŝi dediĉis la premion al Belorusio "subpremata de la historio", kaj dankis al Svedio ĉar "ĝi komprenas la rusan doloron".

Ŝi kritikis Putin: "Mi amas Rusion, sed ne tiu de Stalin kaj Putin".

"La rusa interveno en Ukrainio estas eksterlanda okupado. Nek plaĉas al mi la rusoj kiuj per 84% petas mortigi la ukrainojn", "Oni ne devas cedi al totalismo". Kremlo respondis per "eble Setlana ne konas ĉion, kio necesas por taŭge taksiti tion, kio estas okazanta en Ukrainio".

Ŝi memorigis la vortojn de unu el ŝiaj roluloj: "Nur sovetiano povas kompreni alian sovetiano", kaj aldonis: "Ni havis ununuran memoron. La saman: tiu komunista".

En ŝiaj verkoj ("Sorĉitaj de la morto", "La milito ne havas vizaĝon de virino", "Preĝo por Chernobil", "Knaboj el zinko"....) estas la kolektiva dramo pri la ruiniĝo de Sovetunio kaj de ĝies imperiisma mito... tamen ankaŭ rakonto pri la naskiĝo de la nova Rusio, post popol-korusa "bonan nokton, sinjoro Lenin".

JoKo

Retadreso pri la EF-grupo:

- por ĝin viziti - <http://groups.google.com/group/EU-federo>

--- jen **pri Granda Rusio:**

Rusio helpas al la siria prezidento Assad, kontraŭ ribelantoj kaj kontraŭ la t.n. Islama Shtato; ĉefe por teni sian militbazon en la Mediteraneo.

Kaj jen 2 mesaghoj de la Europaj Federistoj, kiuj montras ke europanoj sentas malkomforton pro Rusio:

Elmerghas demandoj, ekz-e:

Kial Rusio sendis la flamigajn Stalin-orgenon Buratino en orientan Ukrainion ?

Ĉu oni timas malvarman vintron tie ?

Jen 3 mesaghoj de JoKo / Europaj Federistoj:

Norvegio (Nato-membro) ĝisdatigos siajn armeajn defendojn, kvankam

ĝi kunpartigas kun Rusio nur etan limon en la artika regiono, kie tamen okazis kresko de la arma agado.

La admiralado de la mararmeo anoncis ke:

- La Putin-Rusio montris esti preta uzi la armean forton por atingi politikajn ambiciojn;
- Necesos pliampleksigi la bilancon je kromaj 21 miliardoj da dolaroj;
- La arma agado de Rusio, kaj en Ukrainio kaj en Sirio, estigis malcertecon en tuta Eŭropo;
- Norvegio estas ricevanta informadikajn kaj terorismajn minacojn.

La ministro pri defendo aldonis ke:

- la okcidentaj interrilatoj kun Rusio daŭre ŝanĝis pro la rusa agado en Ukrainio;
- fronte al ni estas alia Rusio... kaj ne temas pri dumtempa situacio: la situacio ŝanĝis, kaj profunde ŝanĝis.

Aliaj eŭropaj landoj ĝisdatigis sian defendokapablon:

- Pollando ĝisdatigis sian armean planon je 35 miliardoj da dolaroj;
- Pollando kaj Svedio subskribis armean kooperon pro la armeaj rusaj timigoj;
- Svedio pliiĝis sian armean elspezon je 11%.

La pola ministro pri defendo deklaris ke "la balta maro fariĝis danĝera maro.

Internacia observanto de OSKE ekvidis je dispono de la separistoj la rusan raketsistemon Buratino TOS-1

Ĝiaj pluraj raketoj disvastigas brulemajn likvojn [kaj eble ĝi estis uzata en la pluraj incendioj okazintaj ĉirkaŭ la nuklea centralo de Ĉernobil].

La armilo, produktata nur de Rusio, neniam eniris Ukrainion antaŭ la komenco de la konflikto.

2015-09-25:

Parlamentano de "Rusio Unuiĝinta", la partio de Putin, malkaŝigis:

- ke specialaj fortoj de Moskvo intervenis por "alcelaj misioj" en la orientajn ukrainajn regionojn nur "kiam nepre";
- kaj ke tamen nuntempe ne estas regulaj trupoj de la Rusa Federacio.

Laŭ la parlamentano kvar estintus la cititaj "alcelaj misioj" de la rusa armeo, konsistantaj el malpli ol 3mil specialaj trupoj:

- en aŭgusto 2014, por "liberigi la urbon Ilovaïsk" (en la regiono Donetsk), kaptita de ukrainaj armeanoj;
- en oktobro 2014, "kun antaŭgarda celo, por permesi la akazigon de la lokaj elektoj";
- en januaro 2015, dum la pacintertraktado en Minsk, por "savi Debaltsevon kaj trudigi la ukrainajn armeanojn al retiriĝo";
- en aŭgusto 2015, "kun deadmona celo, kiam Kiev amasigis 90mil armeanojn kaj pretis ataki".

Laŭ la sama fonto, nun estus neniu regula rusa armeano, kvankam restus 60mil volontuloj, el kiuj:

- 40mil el la orientaj ukrainaj regionoj;
- 10mil ukrainaj venintaj de aliaj regionoj;
- 10mil el la cetera mondo, el kiuj ĉirkaŭ 9mil el la rusa federacio.

En la pasinto Kremlo neniam agnoskis kiun ajn rektan implikiĝon en la konflikto, agnoskante nur la ĉeesto de volontuloj.

Sed la Nato-Sekretario en Ukrainio ĵus deklaris ke Rusio daŭras armigi la separistojn, malgraŭ la militpaŭzo.

Sed tiaj raportoj - pleje minimigaj kaj adaptigitaj - nur celas renversi la veron. Kvazaŭ ili dirus: ni ja deklaris la malveron, sed ni eniris Ukrainion nur esceptokaze kaj kun eta konsisto de fortoj por kvietigi... sume temis pri bagateloj.

Sed la faktoj diras alie: mortis 8mil homoj!

Kaj ne nur: la imperiistaj rusoj ĉiam povos diri "tion ni faris en Osetio (Kartvelio), en Transnistrio (Moldavio), en Orienta Uktainio... tion ni povos fari ĉiam ĉe niaj limoj".

Ĉu povas esti trankvilaj la ĉelimaj landoj? Kia internacia juro donas al Rusio la rajton agresi la ĉelimajn landojn?

JoKo , Retadresoĵ pri la EF-grupo:

- por ĝin viziti - <http://groups.google.com/group/EU-federo>

==

2015-09-01 Tibeta Autonomia Respubliko dum 50 jaroj

La komunista registaro de la P.R.Chinio fortranchis la nord-orientan regionon Kham kaj la orientan Amdo, kiuj ighis normalaj provincoj de la imperio; tiel malgrandigis la iaman Tibeton al TAR - chine orienta trezorejo. Bedaurinde mankas autonomio. En PRCh estas pli ol 800 tibetaj politikaj malliberuloj. La peto de Dalai Lamao pri kultura autonomio estas neglektata; li mem rigardata kiel shtata malamiko. Pli ol 130 homoj - plejparte gemonahoj membrulighis kontrau tia politiko. Oni festos pompe.

Detaloj en Vikipedio - ĝenerala artikolo en Esperanto mankas.

https://eo.wikipedia.org/wiki/Akordo_po_dek-sep_punktoj_por_la_paca_liberigo_de_Tibeto

2015-09-08: nuntempe dek-miloj da rifughintoj fughas al Europo, char en sia lando ili estas en danghero, au char ili tute ne vidas bonan estontecon por sia familio.

La regulo "Dublin III" [dablin tri] neniam taugis, char rifughintoj alvenas pleje je la sudaj limoj; sed tie ne chiuj povas resti.

Do, necesas akcepti ilin en chiuj (EU-)landoj.

2015-09-06 UN kunvokis en Istambulo la unuan pintkunvenon pri monda migrado Ĝi okazos la 23an kaj 24an de majo 2016 kun la oficiala nomo "homarana pintkunveno"

En la lastaj 25 jaroj kreskis la kvanton, la kompleksecon kaj la gravecon de la homaraj krizoj:

- en 2014 pli ol 400 konfliktoj je politika origino kuntrenis 50milionojn da homoj. Krome 40 el tiuj konfliktoj karakteriziĝis kiel konvencia milito aŭ terorismo;

- la naturaj katastrofoj - el kiuj pleje ligitaj al klimataj ŝanĝoj, aŭ akvomanko, aŭ urbanizado aŭ demografiaj kialoj - efikas sur la vivo de 100milionoj da homoj ĉiujare. Kaj okte la katastrofoj ripetiĝas antaŭ ol la frapitaj komunumoj sukcesis restabiliĝi;

- la sociaj kaj ekonomiaj vundebloj kreskigas la homarajn krizojn: ekde 1990 kreskis la proporcio de homoj en ekstrema malriĉeco, vivantaj en fragilaj landoj, kies registaroj ne povas - aŭ ne volas - liveri bazajn servojn aŭ promocii la socian egalecon.

Sekve de tio nuntempe pli ol 250milionoj da homoj estas viktimoj aŭ je risko de homaraj krizoj. Kaj meze de 2015 preskaŭ 80milionoj da homoj en 37 landoj bezonas homaranan helpon, inter kiuj 60milionoj da evakuintoj.

Jam la EKM-ano pri homaraj helpoj rimarkigis ke:

- la homaraj helpoj malbone funkcias, por ilin plibonigi necesas kompreni kiel ŝanĝis la mondo;

- la financadoj por homaranaj urĝoj estas nesufiĉaj.

(dankon al JoKo - [Eŭropaj Federistoj]: <http://groups.google.com/group/EU-federo>)

==

2015-08-28 Germanio akceptis ke venu rifughintoj ...

aparte el Sirio, kaj ankaŭ aliaj landoj, char Italio kaj Grekio petis dividi la shargon. Chi jare oni atendas 800.000 da rifughintoj; tio egalas al 1% de la populacio de Germanio.

Bedaurinde en pluraj germanaj urb(et)oj okazis manifestacioj kaj ech bruligoj kontrau domoj, kiuj estis dedichitaj por rifughintoj, char kelkaj homoj timas ilin, kaj timas la elspezon da mono por ili.

Sed pli ofte estas libervoluloj kiuj subtenas la integriĝon de rifughintoj.

Se chiu EU-lando akceptus rifughintojn estus pli facile - por chiuj.

Verduloj delonge plendas por enmigrado-regulo por Germanio sed ankaŭ por EU. Tiel eblus redukti la amason da tragedioj sur la maro kaj en kamionoj, kaj la gigantajn kostojn por pagi al la rifugho-organizantoj.

Komento AVE/mw:

EU ja povas influi al Balkanaj regionoj, por plibonigi la viv-kondichojn tie. Kio pri landoj kiel Sirio, Libio - kie usonaj liberigho-revolucioj kauzis la maksiman haaoson ? Chu eblas atendi ghis venkas la tradiciaj tribaj reguloj ? Mi ne scias ?

Atentigi la homojn, ke la kvanto da infanoj en unu familio estu bone pripensata. Poste la junuloj bezonas laboron. Granda helpo estus asecura sistemo, kio garantius al maljunuloj decan vivon, ech sen granda familio.

--

2015-08-28 La ukraina reghisoro Oleg Sencov punita sub stranga akuzo.

Oleg Sentsov estis arestita en 2014 pro terorismo kontraŭ la rusa aŭtoritato kiu okupis Krimeon, lian naskiĝregionon. Ja Sentsov naskiĝis en Simferopolo en 1976 kaj neniam lasis sian regionon, eĉ longtempe vivante ankaŭ en Kievo.

En la tempo de la protestoj kontraŭ jama prezidento Yanukovich li tuj aliĝis la movadon Automaidan. En Krimeo li liveris manĝaĵojn kaj necesajojn al ukrainaj soldatoj enkaptitaj en iliaj bazoj. Li do neniam partoprenis perfortan agadon, kaj kompreneble li sin deklaris viktimo de politika proceso.

Tiel okazas en Rusio: oni interŝanĝas oligarkojn kaj finegocistojn kun ĉampionoj de demokratio, dum etaj homoj elpagas en absoluta silento la prezon de kuraĝaj elektoj.

Sentsov ne celis fariĝi sensacia "malamikoj de Kremlo" kaj restis sola staranta antaŭ juĝsistemo farsa kaj brutala. Sed ĉifoje - starante kiel akuzito - estis li kiu admonis en sia fina parolado:

"Ankaŭ ni havis kriman reĝimon, sed ni ĝin defis. Oni ne volis nin aŭskulti, tial ni sonorigis ladbotelegojn kiel tamburojn. Oni ne volis nin vidi, tial ni bruligis pneŭmatikojn surplace. Kaj fine ni venkis. Same okazos al vi, pli aŭ malpli baldaŭ. Mi ne scias kiel tio okazos kaj mi volas ke neniu suferu pro tio. Simple mi esperas ke vi ne plu estos ragataj de krimuloj".

(dankon al JoKo, EU-Federistoj)

Ech pli:

Same kiel Sentsov estas pluraj aliaj ukrainanoj, kiuj estis kaptitaj - parte en Ukrainio - kaj akuzataj en Rusio. Oni ne montris verajn pruvojn, ĉar tio ne necesas. Ili ne ricevos justan proceson.

La sekvaj supozeble estos la krimeaj tataroj kiuj ne emas vivi sub la jugo de la nova caro, kaj eble protestos - ili estos akuzotaj teroristoj.

Bedaurinda lando Rusio.

(lau komento en taz, 2015-08-27, p.10 kaj 12)

==

2015-08-19 La ukraina reghisoro Oleg Sencov punota sub stranga akuzo.

La prokuroro altigis la proponitan punon al 23 jaroj.

Pro kio: politiko

Lau multaj homoj li estas senkulpa, sed tio ne gravas al ŝtato kiu militas.

Amnestio Internacia kaj la kolego Wim Wenders defendis lin.

En la hodiaua proceso, la ĉefa atestanto diris, ke li sub devigo kulpigis lin. Sed tion la prokuroro ne interesis.

http://www.deutschlandfunk.de/russland-der-ungeliebte-regisseur.1773.de.html?dram:article_id=328683

Komento AVE/mw:

Oni povus diri: Usono havas sian Guantanamo, do kial vi plendas kontraŭ la manko da civitanaj rajtoj, kaj manko da sendependeco de la tri bazaj demokratiaj fortoj, kaj mensoganta reghimo en Rusio ?

Ambau malbonas.

2015-08-19 Estona sekureco-oficisto punita pro spionado al 15 jaroj en Rusia Pskow.

Ankau tiu kazo estas dubinda. Estonio diris, ke li estis kaptita en la lima zono al Rusio.

La EU-oficistino pri Ekstera Politiko protestis, kaj diris ke tiu proceso estis maljusta.

<http://www.deutschlandfunk.de/spionage-este-in-russland-zu-15-jahren-haft->

verurteilt.447.de.html?drn:news_id=515644

==

2015-08-15 Ukrainio: pro-rusiaj separatistoj denove jhetas obusojn ech al logh-domoj. Chu la nuna celo evidente estas Mariupol, je la bordo de la Asova Maro ? Kompreneble la ukraina flanke reagas. Lau aktuala raporto de Jan Palukat. Li ankau menciis grandajn arbaro-brulojn chirkau Chernobilo (per kiuj radioaktiveco estos disvastigata):

[http://www.deutschlandradio.de/text-und-audio-suche.287.de.html?search\[submit\]=1&search\[word\]=Ukraine](http://www.deutschlandradio.de/text-und-audio-suche.287.de.html?search[submit]=1&search[word]=Ukraine)

-

2015-08-14 Rusio pli kaj pli premas civitanajn iniciativojn, aparte se tiuj kunlaboras kun eksterlandaj samideanoj.

Rusaj CSO-oj ne rajtas kunlabori kun tiaj eksterlandaj „agentoj“, se oni trovas literaturon de tiaj ili povas esti punataj.

En la rusa parlamento oni diskutas legh-proponon, kiu malpermesas anti-rusian propagandon - chu post la ekvalidigo de tia legho ankoraŭ eblos kritiko ?

Rusio pli kaj pli re-marshas al sovetiaj tempoj.

(lau HBS, Moskvo, Bad. Ztg. 2015-08-14, p.6)

Komento AVE / mw: Mi revas kun-vojaĝi 2017 en trajna karavano de St. Peterburg al Seulo; sed ne povas dum estas milito inter Rusio kaj Ukrainio, kaj dum estas tia subpremo de civitanaj rajtoj, kiaj necesas por moderna malfermebla ŝtato.

-

2015-04-29 Rusa NTV produktas mensogajhojn / kalumnias - jen alia ekzemplo: Ili raportis ke la ukraina armeo mortigis 10-jaran knabinon en urbeto proksime de Doneck.

Natalia Anteleva, ĵurnalistino de la brita BBC, serĉis la familion de la knabino, sed ne trovis familion kies knabino estis mortigita du tagojn antaŭe.

Demandis la civitanojn, separatistan respondeculon, en la restadejo de mortintoj, finfine rusajn ĵurnalistojn kun kiuj BBC vizitis la regionon. Montrighis ke ne okazis tia murdo. Finfine: ĵurnalistoj de rusa NTV diris: „la raporto bazighas sur informo de separatistoj“

La ĵurnalistino komentis, ke per tiaj kalumniaĵoj Rusio semas malamon inter la homoj. Laut russischen Medien soll die ukrainische Armee eine Zehnjährige getötet haben. BBC-Korrespondentin Natalia Antelava findet heraus: Der Fall ist offenbar frei erfunden.

<http://www.ardmediathek.de/tv/Reportage-Dokumentation/Geschichte-im-Ersten-Ukraine-Grenzlan/Das-Erste/Video?documentId=29430680&bcastId=799280>
29.04.2015 | 04:18 Min. | Verfügbar bis 28.04.2016 | Quelle: NDR

==

2015-08-02 Turkio - nekomprenebla autokrateco ?

La turka prezidento Erdogan, AKP, antaŭnelonge perdis la absolutan superecon pri Turkio, ĉar pli liberala partio, HDP gajnis ĉ. 10% je la lasta tutlanda baloto . HDP devenas el la kurda sfero, sed enhavas ankau ne-kurdajn politikistojn - inter alie la turkan Verdand partion, Yeşiller ve Sol Gelecek Partisi, kiu partoprenis la lastajn elektojn ene de la HDP.

La kurdaĵ soldatoj en Irako batalis ghis nun iomete sukcese kontraŭ la mem-nomumita Islama Ŝtato, kiu estas fi-fama pro siaj kruelecoj. Turkio ech subtenis la IS ne-deklarite sed fakte; kaj aliflanke malhelpis la turkajn kurdojn helpi batali kontraŭ la IS-on.

Ĉar (lau iuj informoj) kurdaĵ PKK-anoj mortigis du turkajn ĵurnalistojn, Erdogan nun finis la packontrakton kun la PKK kaj bombis kelkajn el iliaj pozicioj, ech ne la najbara Irako.

Jen artikolo pri tiu aktuala batalo inter Turkio kaj la kurdoj en la germana gazeto Frankfurter Allgemeine:

<http://www.faz.net/aktuell/politik/ausland/europa/tuerkei/kommentar-erdogans-krieg-gegen-die-kurden-13725921.html>

Komento - opinio & suspekto de AVE/mw:

Erdogan unuflanke volas eljheti la HDP el la parlamento, kaj pro tio akriĝas la problemoj rilate la kurdojn en Turkio.

Aliflanke evidentas ke la kurdoj - kiuj ne ricevis agnoskon kiel nacio kun propra teritorio, kaj loĝas ĉefe en Turkio, Irano, Irako kaj Sirio - tendencas havigi al si propran ŝtaton. Tiu nun videbligis en la norda parto de Sirio kaj Irako - povus esti ke Turkio volas malebligi tion. (dankon al Mirejo pro la precizigo)

==

2015-07-17 Kiu pafis al MH-17

antaŭ unu jaro je la 17-a de Julio 2014 estis pafita per rakedo la civila aeroplano MH-17 super la teritorio de Ukrainio.

La 298 viktimoj estis plejparte nederlandanoj kiuj vojaĝis al Kuala Lumpur.

La restaĵojn de la aviadilo oni kolektis, transportis al Nederlando kaj analizis tie.

Jam de la komenco, kaj subtenata de multaj indikoj kaj parto-pruvoj, oni suspektis ke la rakedo estis pafita flanke de la rusio-amantaj separatistoj, aŭ de rusiaj t.n. libervoluloj. Plena pruvo ankoraŭ mankas.

Bedaurinde la rusa registaro ne emas subteni agadon eltrovi la veron, kio estas plia indiko por ties kun-kulpo je tiu atako.

Estus sagha, kvankam eble multekosta, ke Rusio kunlaborus - honestaj homoj farus tion.

Bondezirojn, ankau al niaj rusaj geamikoj,
amike, manfred

2015-07-23 P.R.China registaro kondukas strange:

- preparas leĝon kiu mal-legaligus civitanaj organizajhoj kiuj kunlaboras kun eksterlandaj CSO-oj (civil-sociaj organizajhoj) - ĉi-kaze prezidento Xi kondukas kiel la najbara kolego Putin.

- dum la nun finanta Ramadanano malpermesis al islamaj studentoj, lernantoj kaj ŝtataj oficistoj en la provinco XinJiang (uzurpita pli kaj pli de han-ĉinoj) teni la religiajn regulojn ne trinki dumtage, ne manĝi porko-viandon, ktp.

(lau taz, 2015-07-23 kaj 24, p-oj 10)

Evidente Homaj Rajtoj ne validas por ĉinoj.

- malliberigas ĉ. 40 (?) advokatojn pri homrajtaj akuzoj;

- ankau en Tibeto, malgrau nomumita Autonoma Provinco, la ŝtato ankau enmiksighas en la religia vivo, uzas la budhismon ĉefe por allogi turistojn.

= = = en la reto:

2015-06-16 Putin-a TV mensogas pri la Praga Printempo

TV „Rossija 1“ informis pri la minacantan en-marŝon flanke de NATO-trupoj en 1968.

Eble vi rememoras: La t.n. „Praga Printempo“ (Havel, Dubcek, k.a.) kiu dumtempe sukcesis lasi pli liberan diskutadon kaj klopodis evoluighi al pli demokrata sistemo.

Lau Putin necesis protekti Ĉeĥoslovakion kontraŭ la NATO, pro tio oni sendis la tankojn al Prago en Aŭgusto 1968.

La ĉeĥa asocio „Open Doors“ (malfermaj pordoj) protestas kontraŭ tia propagando. Ili ne volas ke Putin denove helpos siajn „fratojn“ alilande, kiel nuntempe en Ukrainio.

(lau A. Mostyn (Prago), taz 2015-06-16, p.10)

Komento (mw): fakte ne estis Putin kiu diris tion; tamen sia TV-stacio certe ne elsendos dokumentan raporton ne kongruan kun Putin-a doktrino .

==

2015-06-09 Kievo: brulas giganta nafto-stokejo

<http://www.badische-zeitung.de/inferno-bei-kiew-riesiges-treibstofflager-brennt>

Komento AVE/mw: Povas esti pro malbona prizorgo, sed povas esti ankaŭ pro sabotado.
===

2015-05-29 Rusio survoje - kien ???

MB Khodorkhovsky organizis dokumento-filmon pri Chechenio kie Ramsan Khadyrov korupte regas. Evoluo kiun oni montras pri Grozny shajnas esti Potemkina, kaj opoziciuloj vivas en danĝero: W3.khodorkovsky.com/

2015-05-29 Rusio preparas novan militon

Rusio estas delokanta armeanojn kaj armilaron ĉe la ukraina limo, entenate raketĵetiloj kaj tankoj.

Laŭ la Reuters-agentejo la armilaro koncentrita ĉe la limo estus triobla ol tiu de la pasinta marto; inter ĝi veturiloj sen numerplato aŭ identigaj karakteroj, kio pensigas ke la armilaro celas subteni la secesiistojn.

Krome la stratoj en la regiono de Luhansk, kondukantaj al la limo, estis riparitaj por permesi la cirkuladon de tankoj.

La timo estas, kiel jam anoncite de NATO, ke separistoj estas profitantaj el la militpaŭzo por rearmiĝi kaj pretigi novan militan atakoperacion kun helpo de Rusoj. (laŭ [Europaj Federistoj])

kaj kiel kashi rusiajn soldatojn en Ukrainio ?

Multaj rusiaj soldatoj servas en orienta Ukrainio. Kelkaj revenis vunditaj au en cherko, tute silente, informon oni ne shatis. Nuntempe estas 2 rusiaj soldatoj kaptitaj en Ukrainio, kiuj ne mensogas. Mi proponas al ili resti en Ukrainio.

Nova dekreto de la prezidento de Rusio ech malpermesas informi pri soldatoj kiuj mortis en „specialaj okazajhoj“.

(laŭ taz, 2015-05-29, p.10)

2015-05-19 Rusio neutraligas CSO-ojn:

Nova legho venos - nur 3 parlamentanoj kontrauvochis - kiu ebligos al la shtato malpermesi internaciajn Civil-Sociajn Organizajhojn, ekz-e Amnestio Internacia, Human Rights Watch, Transparency International.

Ne necesas jughisto.

Legho de la (antaŭ)lasta jaro jam metas la titolon eksterlanda agenteo al asocioj kiuj kunlaboras kun la eksterlando, kaj ricevas subtenon el eksterlando. Tio rilatas ekz-e al Memorial

(laŭ wikipedia.de, Deutschlandfunk.de - serchu „Russland Memorial“)

===

Karaj geamikoj,

koran dankon al tiuj tri kiuj jam informis pri subteno de la operacio de Wakuru, juna virino kiu daŭre perdas sangon. Jam alvenis 120 Euroj, sed mankas la sama sumo. Do mi petas la aliajn subteni per 10 - 20 euroj.

Prefere al la UEA-konto de Mramba Simba Nyamkinda: smba-n "operacio Wakuru Peter, de ..."

Mi esperas ke AVE-anoj povos kunveni okaze de la Germana Esperanto-Kongreso, malgraŭ la striko de trajn-shoforistoj.

Kaj jen eta informo pri la estonteco de demokratio en Rusio.

Bondezirojn, amike, Manfred

2015-05 malferma socio en estonta Rusio

MB Khodorkovski subtenas la evoluon de Malferma Socio en Rusio. Supozeble Putin regos dum pluraj jaroj, tamen la Malferma Socio gravas por evolui la politikan intereson de la civitanoj.

Li preferas la kunlaboron de similpensantaj opoziciaj partioj. Kaj opinias, ke Rusio bezonas politikajn agantojn kiuj sekvas demokration surbaze de jur-shtateco, dividitaj sendependaj shtataj fortoj (leghdono (parlamento), regado, jurisdikcio) kaj elekto-balotoj surbaze de samaj eblecoj.

(lau: Khodorkovksy.com)

===

2015-05-14 Burundio en shtatrenverso - letero el la lando

Karaj amikoj dise tra la mondo, saluton

Per tiu mesagho mi volas sciigi chiujn aliajn amikojn kion Burundio trapasas nun.

Antau chirkau unu monato burundianoj manifestacias kontrau la tria mandato de la eliranta shtatestro NKURUNZIZA Pierre, kontrau ties volo sed por respektigi la konstitucion. NKURUNZIZA Pierre mortigas, amasbuchas, enprizonigas milojn da viroj kaj virinoj por sia profito, ne de la publiko. Spite al la konsiloj el diversaj politikistoj, shtatestroj, Neregistaraj organizoj, civila societo.

Hieraumatene pli ol du mil virinoj manifestaciis kontrau li pro la mortigo, enprizonigon de siaj infanoj, edzoj, ktp dum li mem cheestis kunvenon de shtatestroj de la okcidenta afrika komunumo-landoj en Dar -es Salaam, Tanzanio en kiu kunveno partoprenis ankaŭ la Ruanda shatetstro Paul KAGAME, Uganda shatetstro YOHERI Museveni Kaguta, Kenja UHUUH Kenyatta, Sudafriko-delegacio, ktp. Bedaurinde chirkau 12 lokaj horoj iu burundia generalo Godefroid NIYOMBARE anoncis tra iu privata radistacio pri la coup d'etat kontrau NKURUNZIZA Pierre,

En Tanzanio la shatetstro ne povis eliri el sia hotelo ech antau la komenco de la kunveno, kiam li eksciis pri la coup d'etat la Tanzania shatetstro Jakaya Morisho KIKWETE, kiel la nuna estro de EAC (East Africa Community) forte kondamnis la konduton de la burundia generalo Godefroid NIYOMBARE. NKURUNZIZA ne povas reveni al Burundio ghis chio ordighas, sed kiam. ?

En Burundio la coup d'etat kausas interbatalon inter militistoj kiuj subtenas kaj tiuj kiuj ne lin subtenas, neniu povas trairi la urbon, personoj enfermighas en domo, nenio okazas kiel aktivado, homoj riskas morti pro malsato kaj malsano endome, chiuj servadoj ne funkcias, ktp. pafikreplitado kaj grenadoj.

Antauhierau oni bruligis junulon per arda kaj fajra pneuo chirkau kolo char li partizanas al la reganta reghimo.

La milito intensighas tagon post tago, homoj mortas, oni mankas nutrajhon, oni ne povas enhospitalighi, shtataj funkciuloj ne povas labori, nek la trafiko. Chio estas malbona.

La flughaveno estas barikadita, neniu aviadilo povas flugi au surterighi. Nun la nacia radio-televidstacio estas sub kontrolo de disidentoj.

Hodiaumatene, je la 4aj horoj matene oni bruligis kvar privatajn radistaciojn interalie BONESHA, RPA.

Por ni chio estas sombra kaj nenia espero de la futuro, la urbo alsimilas al la ghangalo, chio estas trista.

Mi memoras kiam genocido okazis en Ruando 1994, tion preterrigardis la mondo ghis la amasbuchado de la minoritata tucia etna grupo, pli ol 800,000, chirkau unu miliono da senkulpuloj inter kiuj infanoj, virinoj, ktp mortis nur pro tio ke ili estis tucioj

Chu la mondo ion vidas kaj ion povas fari ?

Amike, Birindwa Mushosi

Mutakura 5ème Avenue. N°30

E-mail: birindwamushosi@yahoo.fr

Tél. (+257)79 446 479

Bujumbura, Burundi

===

2015-04-21 Protestantoj en danghero tutmonde:

temas pri homoj, ofte indighenaj, kiuj protestas kontrau la misuzo au plena akapero de sia lando flanke de investoroj, kiuj kutime „danke al“ koruptaj oficistoj kaj registaroj perdas sian terenon.

Aparte en Meza kaj Suda Ameriko (Honduras, Brazilo kaj Kolumbio) kaj en Filipinoj kaj aliloke dungitaj murdistoj en 2014 mortigis (minimume) 116 homojn kiuj protestis kontrau tia akapero.

La organizo Global Witness zorgas por la kolekto da tiaj informoj.

(lau E. Oer, taz, 2015-04-21, p. 13)

2015-04-16 La rusa Prezidento V. Putin paroladis:

Li respondis dum ch. 4 horoj al ch. 3 milionoj da demandoj de rusaj civitanoj. Bone. Li ankaŭ akceptis la plendojn de normalaj homoj, kaj signalis helpon. Sed pri politiko: li iomete mensogis, dirante, ke Rusio ne havas „imperiajn ambiciojn“, „sed evoluos kunlaboron kun najbaraj landoj kie vivas rusoj“. Kaj ankaŭ ke „nun ne estas rusaj trupoj en Ukraine, kaj ne okazos milito je la sud-okcidenta limo de Rusio“. Kio rilatas la demokration ene de Rusio, li parolis pri „la utileco ke la opozicio partoprenas lla balotojn“, sed en la sama tempo lia Sekureculoj okupaciis la oficejon de „Malferma Rusio“ de Khodorkovsky. Legu pli je khodorkovsky.com

Lia parolado estis vaste auskultata. Mi legis tian en diversaj gazetoj, i.a. New York Times, sed ankaŭ trovis resumojn el Wedomosti kaj Kommersant.ru, kiuj ne tro laudis la prezidenton.

Komento AVE/mw: shtatoj mensogas kiam ili sentas la bezonon. Shtatoj ja ne havas religion – ech ne la rusa, kiu apogas sin sur la ortodoksa eklezio. Nur strange, ke Putin en Decembro ploris pri la rompighinta imperio SU, kaj finfine konfesis ke rusaj soldatoj liberigis Krimeon. Tiuj soldatoj alvenis sen naciaj emblemoj.

Eble Putin ne pure mensogis, ĉar li eble estimas Donbas kaj Lugansk kiel sendependaj shtatoj

Kaj samtempe estas multaj politikaj malliberuloj en rusaj malliberejoj au gulagoj.

2015-04-19 Pri Ukrainio:

POLLANDO FORTE SUBTENAS UKRAINION. La pola Prezidento Bronislaw Komorowski, ĉeestante la ukrainian parlamenton, denunciis la rusan agreson kaj klopodos por ke ĉiuj landoj kaj popoloj de Okcidento subtenu Kievon: “Batalante kontraŭ la rusfavorantoj, la ukraina armeo defendas ne nur sian teritorion, tamen ankaŭ la tutan Eŭropon kontraŭ la revekiĝo de la imperiista penso. Okcidento komprenu ke ĝi estos sekura nur se Ukrainio estas sekura”

Pollando subtenas Ukrainoin ne nur politike, tamen ankaŭ finace, liverinte prunton je 100 milionoj da € por reformigi la energian sektoron kaj por plifortigi la limojn”.

LA 5 SKANDINAVIAJ LANDOJ PLIFORTIGAS LA ARMEAN KOOPERON. Citante la aneksadon de Krimeo kaj la rusan intervenon en la ukraina krizo, la Defendministroj de Svedio, Norvegio, Finnlando, Islando kaj Danlando difinis Rusion "la ĉefa minaco al la sekureco en Eŭropo".

Norvegio, Danlando kaj Islando ne havas propran armeon sed nur polickorpuson, partoprenante tamen Naton; Svedio kaj Finnlando ne partoprenas Naton.

(de J-K Rinaldo, E-Federistoj)

Komento AVE/mw:

Intertempe mortis pli ol 6000 homoj (en tiu milito de Rusio por konkeri la sud-orientan parton de Ukrainio). Bedaurinde ankaŭ multaj post la Minsk-2-interkonsento. Al ili necesas nombri la mortpafitajn por-rusiajn homojn en Kievo kaj Odeso.

===

2015-04-19 Genocidoj tutmonde: Herero, Armenoj, Judoj ...

Okaze de la centjarigho de la komenco ekstermi la Armenojn en la Osmana Imperio (nun Turkio), indas pripensi tiajn kruelojn – tutmonde.

bedaurinde tiaj shtatoj ech nun ne emas agnoski tion, sed persekutas jhurnalistojn au verkistojn kiuj informas.

Sufiche detalan informon pri multaj genocidoj vi trovas en eo.wikipedia.org .

Mi nur volas atentigi: gravus, ke ankaŭ la nuna turka shtato akceptus la nacian pekon kontraŭ la armenoj.

Krom tia provo ekstermi grandskale etnan homgrupon, indas pripensi ke humiligi tutan etnon (kiel faris ekz-e la Japana Imperio meze de la 20-a jarcento al ĉinoj kaj koreanoj, au nun la Komunisma Ĉinio kontraŭ tibetanoj) simile detruas la Homajn Rajtojn.

===

2015-04-02 Tataroj perdis la rajton informi - Krim(e)o:

ATR estis la televido de la krimeaj tataroj. Kaj ja Tataroj estis kontraŭaj al aneksado de Krimeo fare de Rusio.

La televido ATR estis malfermita en 2006 dank' al licenco de la ukraina registaro. Sed fine de marto, je la eksvalidiĝo de la licenco, la rusaj aŭtoritatoj rifuzis la renovigon: evidenta revenĝo de la novaj aŭtoritatoj, kiuj jam de unu jaro devigis ne elsendi politikajn programojn.

Ankaŭ la tatara radio "Meydan FM" devos fermi, pro tio ke ĝi estas posedata de la ATR mem. Tial Tataroj troviĝos sen elsendvoĉo, kiu ilin reprezentu.

La kontraŭeco de Tataroj havas historiajn kialojn:

- Tataroj estas la praloĝantoj de Krimeo, kien ilin alvenis an la XVa jarcento tien fondante ĥanlandon, poste fariĝinte vasalo de la Otomana imperio

http://eo.wikipedia.org/wiki/Krimea_%C4%A4anlando

- Kiam rusoj en ilia plano je tiama "Nov-Rusujo", eniris militon kun otomanoj (1768-1774), al krimeaj tataroj ili agnoskis la sendependon per la traktato de Kaynarca.

Sed jam en 1783 Rusoj malobservis ĝin aneksante Krimeon, ilin persekutante, ilin senigante je ilia tero, kaj ilin elpelante.

- Poste la restintoj devis alfronti la kolektivigon (kaj la malsatmizeron) komence de la 30aj jaroj.

- Kaj ne nur: en 1944, en la Stalina periodo, la tuta tatara loĝantaro de Krimeo estis deportata en Centran Azion per la preteksto ke tataroj estus kunlaborintaj kun naziistoj (kio tute ne veras). Sed la evidenta celo estis ŝanĝi la etnajn ekvilibrojn favorante la rusigo de la duoninsulo.

- Nur en 1967, ricevinte la "ŝtatpardonon" (pro kulpo neniam farita), ili povis reen-iri en Krimeon.

(de J-K Rinaldo, EU-Federo) <http://groups.google.com/group/EU-federo>)

===

2015-03-10 Tibetanoj daŭre plendas por pli bona autonomio. Mankas demokratio.

En P.R.Chinio estas kelkaj elstaraj malliberigitaj homoj, kiuj kritikis la reĝimon.

La komunisma partio - la sola - ne emas kritikon.

La Popola Kongreso decidis altigi la elspezojn por la militaro, paralele al la kresko de la ekonomio. Pluraj sudaj najbaraj landoj disputas kun PRCh pri la en-maraj limoj; ĉar temas pri la tie kushantaj resursoj.

Eble la nuna persekuto de korupcio estas komenco al pli malferma socio.

2015-03-13 Rusio ne emas prilabori la pasintecon

Memorial-36 estas civitana iniciativo aktive rememori la Stalinajn Gulagojn, kiu montras en originala lagero apud Perm la iaman situacion, kaj tie ankaŭ estis esplorinstituto pri la Stalina teroro. La fama libro de Aleksander Solshenicin Archipel Gulag ja klare skribis pri tio, kaj aliaj rusaj verkistoj skribis pri la Stalina teroro, kiu komencighis post la murdo je la sukcesa inĝeniero kaj politikisto Sergej M. Kirov (1934-12-01)

Pro la malemo de la rusa registaro pri tiaj civitanaj okupighoj, aparte se ili ricevas subtenon el eksterlando (sekve ili estas nomumitaj agentoj de eksterlando - inventajho de Putin), la esplorinstituto estis fermita.

(lau radiostacio Deutschlandfunk, dradio.de, 2015-03-13, matene)

--

2015-03-14 Eksa Sovetunio - Rusio kaj Ukrainio:

La hibrida milito en Ukrainio shajne haltis, kaj Minsk-2 estas observata plejparte. OSKE altigas la homfortojn por kontroli tian rompigheblan pacon. La pezaj armiloj estas disigitaj, sed ankoraŭ Rusio sendas karavanojn en la orientan parton.

La rusa prezidento Putin intertempe oficiale jesis, ke li jam de Marto 2014 planis la akaperon de la Krimeo - kion li ja kiel majstro-shtelista organizis; inkluzive direktita

referendumo. Li produktigis dokumentan filmon por montri sian triumfon. Intertempe la sistemo prezentis homojn kiuj laudire kunorganizis la murdon de Nemcov - sed la mendinto ankoraŭ ne deklaris sin. Nemcov klare kritikis la agresan agadon kontraŭ Ukrainio, kiun respondecas Putin.

Dum tiu tempo indas rememori pri Glasnost kaj Perstrojka, Malfermeco kaj Rekonstruo en Sovetunio laŭ la vizio de Mihail Gorbachov, por eviti la krashon de la ekonomio. Liaj paroloj kaj klarigoj detale - en chiuj sferoj de la socio kaj ekonomio - montris la situacion kaj la bezonojn por modernigi la ŝtaton*. Tiu modernigo donis la eblecon al la randaj ŝtatoj sendependighi el la ne-ŝatata sistemo de la Sovetunio.

Bedaurinde je la 19-a de Augusto 1991 okazis puĉo kontraŭ li, organizita de Komitato por la Eksternorma Situacio kun vic-prezidento G. Janajew kiel parolisto. Ili metis tankojn antaŭ la Blanka Domo kaj Boris Jelcin ricevis la postenon de prezidento.

Almenaŭ estis paco, kaj Rusio regajnis pasho-post-pasho pli bonan reputacion, kaj dank al la altighanta prezo por nafto kaj tergaso ekfloris la ekonomio. Mi ne forgesas ke la rusaj oligarĥoj organizis akaperi konzernojn, ĉar la Rekonstruo ne kalkulis kun tia malsociale avido. La rajtigiloj pri parta posedo je la socialismaj firmaoj (t.n. vaucher) estis disdonitaj al chiuj, sed mankis travidebla informo kaj organizado; pro tio la sciuloj povis kvazaŭ forpreni tiujn paperetojn per malgranda mono (la Rublo ja estis en inflacio kaj la ŝtato eldonis novajn Rublojn).

Kelkaj homoj havis la posedrajton pri la plejgranda parto de la rusa industrio. (certe iom koncizigita klarigo)

Putin ja deklaris la disfalon de la Sovetunio - homoj en najbaraj landoj parolas pri liberigo el la Sovetunio - la plej grandan katastrofon de la 20-a jarcento, eble li forgesis la Grandan Patrolandan Militon (la Duan Mondmiliton). Nune li klopodas re-gvidi Rusion al simila malferma ŝtato.

*) M. Gorbachov, "Meine Vision", el liaj paroloj inter 1985 - 1990-09-11 tradukitaj de la sovetia presagentejo Novosti, elektitaj de H. Novotni, eldonejo Goldmann, ISBN 3-442-12382-8

--

2015-03 „Homoj de Putin“ libro de Kalle Kniivlā

En la 1118-a numero de "la Quinzaine Littéraire" (16-31 décembre 2014) troviĝas dupaĝa recenzo pri la libro de la finna ĵurnalisto Kalle Kniivilä, "Homoj de Putin". Prezo: 15 Euroj. La libro informas evitante kliŝojn kaj propagandon. Tio estas precioza en tempo de konflikto kaj milito, kiam la vero iĝas la unua viktimo. Ĝi bone helpas kompreni la paradoksan politikan situacion ekzistantan nun en Rusio.

Rusa esperantisto skribis legindan recenzon pri la libro. Ĝi estas trovebla sekvante la jenan ligilon: <http://www.ipernity.com/blog/stanislavo-belov/773485>

(laŭ Michael Leibman kaj Joseph CATIL) - Mi supozas, ke la libro estas havebla ĉe UEA ktp..

===

2015-03-03 Ni adiaŭas de Boris Nemcov

Li estis pafita en la dorson, sur la ponto apud la Basilius-Katedralo, Kremlo, Moskvo. Evidente bone organizita atenco, ĉar neĝhoplugo kashis la pafiston plejparte, kiu tuj poste povis forveturi en blanka automobilo.

Tute hazarde pluraj video-kameroj kiuj observis la lokon estis (laudire) malŝaltitaj. Ankau la murdisto de Kirov agadis en alt-protektita konstruajho - li ne estis kontrolita (laŭ Hay en www.de.wikipedia.org)

Nemcov ege kritikis la rusan prezidenton, kontraŭante la aktualan politikon repreni parton de Ukrainio. Li batalis por malferma rusa civilizacio. Li ne estis la unua opoziciulo: li troviĝas en sanga vico - inter ili Sergej M. Kirov, Anna Petrovskaja, Litvinenko, ... Partoprenis la funebrojn politikistoj el multaj landoj; kelkaj estis ne allasitaj, ekz-e el Litovio kaj Pollando. En pluraj rusaj metropoloj okazis funebraj manifestacioj.

Jen koncize en Esperanto, tie vi trovos pliajn detalojn en aliaj lingvoj:

http://eo.wikipedia.org/wiki/Boris_Nemcov

===

2015-02-12 *Paco en Ukrainio eblas*

Post 16-hora diskutado inter la prezidentoj Hollande, Poroshenko kaj Putin kaj la kancelierino Merkel rezultis 12-punkta deklaro, kiu ebligas fini la pafadon ek de la 15-a de Februaro. Unue la separatistaj chefoj, kiuj ne rekte partoprenis la diskutadon, malkonsentis; sed post interveno de prezidento Putin ili akceptis. Ni esperas, ke tio estos vero.

Fakte en la sama nokto trapasis la ukrainian limon 50 rusaj tankoj kun rakedoj - bedaurinde en okcidentan direkton.

Fakte la limo kiu estis definitiva en Minsk I (Septembro 2014) ne plu validas, nun ghi estas pli okcidenta.

http://www.deutschlandfunk.de/ukraine-gipfel-putin-verkuendet-waffenstillstand.1818.de.html?dram:article_id=311400

===

2015-02-08 *la milito de Rusio al Ukrainio - chu eblas paco ?*

La franca prezidento Hollande kaj la chefministro de Germanio, Merkel, konferencis kun la rusa prezidento. Ankau okazis diskutoj okaze de la Sekureco-Forumo en Munkeno kun la rusa ministro Lavrov. Kaj Usono pripensas sendi defendo-materialon.

Aliflanke, ekzistas studajho en la jaro 2008 de la usona Departemento de Defendo, laŭ kiu Vladimir Putin suferas je Asperger-sindromo. Pli pri tio en vikipedio.

Jen la ligilo al intervjuo pri la komunikaj problemoj de Putin (en la germana):

http://www.deutschlandradiokultur.de/ukraine-krieg-oligarchen-veraergert-ueber-putin.1008.de.html?dram:article_id=310867

Ankorau, samtempe oni diskutas sed ankau mortigas homojn en orienta Ukrainio.

===

2015-02-04 *pri la milito inter Rusio kaj Ukrainio*

Mi audis hodiaŭ, ke la milito en orienta Ukrainio pli ekflamis - necesus granda pluvo, ech inundo por estingi ghin.

Stulta agado kiel tro ofte en la historio - por "reteni la vizaghon" oni pretas detrui chion :(

Ambau, la rusaj kaj la ukrainiaj politikistoj devus rememori la verkon de Bertold Brecht "La kaukaza kredo-cirklo".

Mi preferus la solvon sekve de la estonta historio:

la konkreta subteno al Donbass por dauripova evoluo montros al kiu ghi fakte apartenus. Kaj tiam taugas referendumo.

Ahh, ja, la strato inter Rusio al Krimeo: Mi proponas ke Ukrainio donos la veturrajton al rusaj veturiloj, kaj ricevos trapaso-monon por teni la stratojn, gaso-, kaj elektro-dukojn en ordo.

Iam povas okazi internacia jughproceso, kun rezulto al kiu lando apartenas Krimeo.

Tute simple - malpli kosta ol milito - chu ne ?

(propono de Manfred Westermayer, AVE)

===

2015-02-01 *La sunnitaj islamistoj - I.S. - en Sirio senkapigis ankau la duan japanan ostaghon.*

Ili postulis 200 milionojn US-Dolaroj por re-doni ambau jhurnalistojn. Sed Japanio principe ne pagas.

Kurdoj liberigis la kurdan urbon Kobane en Sirio.

Necesas memstaraj UN-trupoj, kiuj povas interveni en tiaj situacioj.

2015-02-01 *Rusio-Ukrainio-Milito denove ne haltigita en Minsk*

Post ch. 5000 mortantoj oni kunsidis dum 4 horoj en Minsk. Sed tie ili ne sukceis trovi interkonsenton, haltigi la bataladon kaj trakti la problemon kiun havas la rus-etna

popolacio en Ukrainio. La papero de la unua Interkonsento de Minsk de 2014 ne validas evidente.

Agresas t.n. separatistoj kun daure sendata materialo (homoj, tankoj ktp) flanke de Rusio. (laŭ Deutschlandfunk.de)

2015-01-30 Rusio montrighas skizofrenia - akuzis Davydova pro nenio.

Svetlana Davydova (laŭ la akuzo) rakontis en Aprilo 2014 al la Ukraina ambasadejo ke la kaserno apud ŝia loghejo estas malplena. Kaj ke la trupo supozeble estas sendita en la direkton de Doneck.

Rusio traktas tion kiel perfidon de ŝtata sekreto. Ŝi estas sep-foja patrino.

<http://www.euronews.com/2015/01/30/russian-mother-of-seven-to-stand-trial-for-treason-over-ukraine-call/>

(dankon al JK Rinaldo por la informo)

Komento de AVE/mw: Ni chiu scias, ĉar la prezidento Putin ja ĉiam diras, ke Rusio ne sendas soldatojn en la najbaran landon (krom al Krimeo, kio jam estis fakte englutita).

Do, iu mensogis - ĉu la virino ĉu Putin ?

Au li kelkfoje ne scias kion li diris antaŭe.

Ahh, li ja diris ke la soldatoj iras tien dum la ferioj; sed strange ke verŝajne tuta kaserno ricevas feriojn dum la sama tempo - ankau stranga afero.

Hierau mi audis ke se tiuj feriantoj hazarde mortas oni ne faras statan funebbron, sed kashas ilin, proksime de Rostov en fridujoj. (informo de Herder-Instituto - iama sciencisto en Riga)

Estas plorinda afero, ke nek la febla OSKE, nek la UN-Sekureco-Konsilio povas haltigi tiun koshmaron, ĉar en UNSK Rusio estas en la komforta situacio tenante la Vetoan Rajton.

Logike la akuzita ŝtato ne rajtus kundecidi - au vetoi.

2015-01 Rusio perdis la voĉdonrajto en la Europa Konsilio post la anekso de la Krimeo. Ĉar tio estis kontraŭ la Internacia Juro. Krom tio Rusio ne plu apartenas al la gvidantaro.

Tiu malagnosko okazis en Aprilo 2014, kaj denove en Januaro 2015, kaj validas ĝhis la sekva sesio en Aprilo 2015 - depende de la fino de la militara invado en Ukrainio kaj tenado de Krimeo.

(en) <http://www.coe.int/en/web/portal/-/renewed-sanctions-against-russian-delegation>

https://de.wikipedia.org/wiki/Europarat#cite_note-7

(retejo de la Europa Konsilio): <http://www.coe.int/>

===

2015-01-09 Ni chiu estas „Charlie Hebdo“

Ni ankoraŭ ne scias, kiu mendis tiun freneze mortigan atakton al la redakcio de tiu satiro-jurnalo - mortis 10 anoj de la redakcio kaj 2 policistoj. Laŭ aktualaj informoj la polico intertempe mortigis la murdistojn, kiuj fuĝis kaj kashis sin; bedaurinde aliloke - en juda vendejo - subtenanto de la murdistoj mortigis kelkajn ostaghojn, antau sia fino.

Teologoj de la Al-Azhar Universitato en Kairo kondamnis tiun atakon kiel „krima agado“. Kaj islamaj teologoj verkis publikan leteron al la gvidanto la t.n. Islama Ŝtato, ke perforto ne kongruas kun la spirito de la Islamo.

Kondolencis kaj montris subtenon multaj politikistoj, i.i. ankau V. Putin.

(laŭ A. Roesch, Bad. Ztg. 2015-01-09, p.2; kaj radio-informo)

Komento AVE/mw:

La satiro celas pensigi pri dogmoj, kiuj malliberigas la homon.

Eĉ se iu estas ghenata pro la satiro - estas neniel kauzo mortigi au lezi la verkintojn.

Kelkaj landoj havas leghojn kiuj malpermesas blasfemion, kiu ghenas la fidelulojn de ajna religio (ekz-en Germanio). Francio estas laikeca ŝtato, aliflanke havas grandan islaman komunumon. Kiu volas vivi en Francio devas akcepti la leghojn.

Aliflanke estas socia afero eduki la homojn kaj doni al ili memfidon. Se mankas laboro kaj perspektivo, tiam estas pli facile malsanighi je fanatismo.